FENIKSO
INFORMILO POR
AMIKA
RONDO DE
ESPERANTAĴ-
KOLEKTANTOJ

Nr. 17. 15. 10. 1971 Tria jaro nr.5

## KIU ESPERANTOSTAMPO ESTAS LA UNUA ?

Ĉiu serioza kolektanto de Esperantostampoj jam posedas la bonegan kaj tre utilan EKIK-katalogon de E-poŝtstampoj el la jaro 1965, *) sen kiu oni ne povas celkonscie kolekti stampojn laŭ la temo: Esperanto.

En ĝi oni legas sub Aŭstrujo, ke la unua porokaza E-stampo estis uzata dum la 8-a UK en Krakow de la 11. - 18. de aŭgusto 1912. Ĝi estas la plej malnova E-stampo entute, ĝi do havas la honoron esti la UNUA.

Sed legante en Enciklopedio de Esperanto, IIa volumo, p. 450 - 51. jaro 1934, ni sciiĝas jenon: S-ro E. Wiesenfeld, pola Esperantisto de 1912 (detala noto pri li sur p. 574 de la sama libro) inter alie skribas; (mi citas laŭvorte):

"Dum la UK-j la poŝtoj de la koncernaj landoj lokigas en la kongresejoj poŝt-oficejon, en kiu la poŝtaĵoj elirantaj el tiu poŝtoficejo estas stampataj per speciala stampilo kun teksto dediĉita al la kongreso. La unua poŝtstam-

po Esperanta okazis dum la IX-a UK en Bern. Svisujo, 1913. Ĝia aspekto: rondo de radio 14 mm, interne de ĝi - dua rondo samcentra de radio 8 mm. En la spaco (zono) inter la du rondoj troviĝas rondire la jena teksto: IX. Universala Kongreso de Esperanto Bern. En la interna rondo iras tra la mezo, horizontale du paraleloj, inter kiuj estas spaco de 9 mm kaj troviĝas jena teksto: 24. VIII. 13. - 3. Super tiuj paraleloj en la segmento formiĝante de la supera paralelo kun la interna rondo - ĝuste en la mezo troviĝas Esperantostelo ĉirkaŭita de malgranda rondeto, kiu tuŝas supre la internan rondon kaj malsupre la mezon de la supera paralelo. Ambaŭflanke de tiu steleto - en la supra segmento - troviĝas po kvin vertikalaj malkreskantaj linietoj. En la malsupra segmento (tio estas en la spaco formiĝinta de la malsupra paralelo kun la parto de la interna rondo) ankaŭ ĝuste en la mezo troviĝas sama rondeto, sed en ĝi la svisa blazono, kruco paralellinia aŭ kiel oni nomas en la tipograf-arto: "neonlinia", kaj ambaŭflanke de tiu blazono samaj vertikalaj linietoj, kiel en la supra segmento.

La sekvantan jaron, en 1914 la Pariza Kongreso ankaŭ havis Kongresstampon, sed en franca lingvo. Rondo de radio 13,5 mm, (nur unu), kaj en ĝi rondteksto: "10-e Congres Int. Esperanto", kaj alidirekte, sed ankaŭ rond-ire: Paris. En la mezo de la stampo - tri linioj horizontalaj, en la unua: steleto, en la dua: 2-8, kaj en la tria: - 14."

\-

Jen la historia teksto de samtempulo en la Enciklopedio de Esperanto. Laŭ li la unua E.sta estis tiu de la 9-a UK en Bern, ne tiu en Krakow 1912. Ĉu li pravas? Ĉu li konsideras la Krakowan stampon ne oficiala, - ne poŝta? Estiĝas la demando: Kial s-ro Wiesenfeld, kiu certe sciis pri tiu stampo, ne menciis ĝin kaj ne priskribis ĝin en sia artikolo same detale,

kiel li faris pri stampoj en 1913 kaj 1914?
Kiu donos la ĝustan respondon?
Inter niaj kolektantoj estas nur kelkaj, kiuj posedas la Krakowan Stampon. Multaj pagus altan sumon, se ili povus aĉeti ĝin. Kiu el la ankoraŭ vivantaj partoprenintoj de la 8-a UK povos diri al ni la veron? La tempo urĝas!

D. Bartošik

*) Ne forgesu la novaperintan AREK-katalogon, (kiu ankaŭ donas numeron unu al la Krakow-stampo). La tekstparto de ĝi estas mendebla ĉe la redaktejo. Prezo: 1 US-dol aŭ 8 rkp.

LA LYONA E.MAŜINSTAMPO KUN P.P. DATSTAMPO

Plurajn tagojn post la redakto de mia artikolo koncerne la diversaj prezentoj de la ĉijara Lyona varbstampo alvenis al mi la informo, ke tiu stampo ankaŭ estis uzata kun ronda datstampo P.P.

Senprokraste mi movis "Ĉielon kaj teron" por ĝin trovi, sed ĝis nun, vane.

Kial tiaspecaj stampaĵoj estas tiel malfacile troveblaj? Mi mem antaŭvidas 3 respondojn:

1) Pli kaj pli la kolektantoj sin interesas pri pm, kiuj ofte estas agrable okulfrapaj bildoj, kaj la "muta" flanko de la poŝthistorio ne ĉiam vekas intereson. Tiuj kolektantoj estas, laŭ mi, "amasigantoj de bildoj", sed ne veraj filatelistoj. Do, pro la foresto de pm tiaspecaj stampaĵoj estas preskaŭ ne konservataj kaj la raraj interesuloj vane ilin serĉas.

2) Alia kialo ŝajnas al mi esti la fakto, ke tiuj stampaĵoj estas uzataj de la poŝto laŭ rigidaj kondiĉoj.

3) Finfine oni plej ofte ilin renkontas sur komerckovertoj/je ne ordinara formato aŭ koloro.

# MANKOLISTOJ

Kiel jam dirite en la unua numero de Fenikso, ne estas oficiala tasko por nia Rondo elsendi la mankolistojn de la membroj, sed ni tamen faras tiun servon, se la membroj mem pagas la elspezon. Do, se membroj mem multobligas sian mankoliston kaj sendas sufiĉan stokon al mi, mi plusendos ilin al la membroj kune kun la Informilo,. - senpage.
Mi ankaŭ povas ĉi tie multobligi la listojn laŭ viaj manuskriptoj similaj al la sekvontaj listoj. Tiuokaze vi devas pagi 2 rkp por listo en formato A5 (sama kiel tutpaĝo en Fenikso).

Post la apero de Stamp-katalogo de Burmeister estas nature, ke oni uzas tiun katalogon je ellaborado de la mankolisto.

Kaj post la "fifama" altigo de la poŝttarifo mi devas esti atenta, ke la pezo de la sendaĵo ne superas 20 gramojn. Tial mi rezervas al mi la rajton uzi mallongigojn en la teksto, evt. prokrasti la kunsendon ĝis venonta malpli peza numero de Fenikso.

La redaktoro.

Mankas al:

Stefan Bielok, Inowroclaw, ul. Nowotki 24 m. 19
Pollando:

AR : ĉiuj
AU : 1, 2, 4, 5ni, 5ve, 5vi, 6, 8ve, 8ni, 8vi,
10,12, 13-1,-2,-3, 15-2,-3, 16-1,-2.
BE : 1, 2, 3, 4, 5, 10.
BRA: 1-1,-2,-3, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10, 11,
12, 14, 16, 17, 18, 19, 20, 21, 23.
BRI: 1, 2, 3, 4, 5, 6, 10, 11.
BU : 1, 2, 3, 4ve, 5vi, 6ve.
ĈS : 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9.
DA : 1, 2.
DG : 1, 2.
FI : 1, 3.
FRA: 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 9, 10, 11, 12,13, 14.
G : 1, 2, 3, 4, 5-1, 5-2, 6-1, 6-2, 7, 8vi,
8ni, 8ve, 9, 11, 12, 13/1,2,3,
15/2,3, 16/1,2.
HI : 1, 2, 3.
HU : 1, 2, 9, 11, 13, 16, 22, 27.
IT : 1, 2, 3ni, 3ve, 4, 5, 6, 7, 9, 10,
12ni, 12ru, 14, 15, 16.
JA : 1, 2, 9, 10.
JU : 1, 2ve, 2ni, 2ve, 3, 4, 5,6ni, 6ve, 8, 9,
10, 12vi, 15ni, 15ve, 17, 18.
MO : 1-4. kun P.P.sta.
NL : 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7ni, 7vi, 10-1,-2,-3,-4.
NO : 2.
PO : 1, 3ni, 12vi, 12ve, 12ru.
SU : 1.
SVE: 1, 2, 3, 5.
SVI: 1, 2, 3, 4, 7/3,-5,-6,-7,-8,-9,-11,-12,
-18,-19,-20,-22.

Afranksta: A-1, A-2.
Sta.div. : B-1, B-3
: TP-1, TP-2
: La "fantazia sta."

Mankas al:

Rudolf Burmeister,
D D R. 9033 Karl Marx Stadt,
Wilhelm Wolff Str. 1.

AU : 1, 2, 5vi, 8ni, 8ve, 13-2, 13-3, 15-3, 17-4
BRA: 1, 2, 3, 4, 5, 8, 9, 10, 13, 14, 16, 20, 22, 25.
BRI: 3, 6.
BU : 1-1, 1-2, 2-2, 5-1 ni.
ĈS : 1-1, 2, 3, 4, 7, 8.
DA : 1.
FRA: 1, 5, 9, 10, 14, Lyon P.P.
G : 1-2, 4, 5-1, 5-2, 7.
HI : 1, 2.
IT : 2, 3ve, 4, 6, 9, 12ni.
JA : 1, 2, 11.
JU : 2-2ni, 4-1, 4-2, 8.
MO : 1-4.
NE : 2, 4, 5, 13.
NO : 2, 4.
PO : nur tiuj neoficialaj koloraj variaĵoj.
SVE: 1, 2, 3.
SVI: 1, 2, 3, 4, 7-2, -3, -5, -6, -7, -8, -9, -10, -11, -12, -13, -14, -15, -16, -18, -19, -20, -21, -22, -23, -24.

Suppl. A1, A3.
B1, B2 kaj R-etikedo Praha.

Mankas al:

Janusz Mikulski, Olsztyn 1, Skr. pocztowa 30
Pollando 8vi

AU : 2, 5vi, 7, 8ve, 9,13/1, 13/3, 15/2, 15/3
BE : 1, 5, 10.
BRA: 1, 2, 3, 5, 7, 8, 9, 10, 11,13, 14, 16,
20, 22, 23.
BRI: 1,2, 3, 6, 7.
ĈS : 7.
DG : 1, 2.
DA : 1, 2.
FI : 1.
FRA: 1, 2, 3, 5, 9, 13, 14, 21.
G : 1-2, 2,3, 5-1, 5-2, 7.
HI : 1, 2.
IT : 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 9,
12ni, 14, 15, 16, 19.
JA : 1, 2, 3, 11.
JU : 1, 2-1, 2-2, 3, 4-1, 4-2, 8/1959,-1960,
15, 17-1, 17-2, 18.
MO : 1-2, 1-4.
NL : 3, 4(1937-39) 5, 7, 8. 10-2,-3,-4, 12.
NO : 2.
PO : 9-1, 9-3.
SU : 1.
SVE: 1, 2, 3.
SVI: 1, 2, 3, 4,
7-5, -8, -20, -21, -24.

Afranksta.: A1, A3.
Diversaj : B1, B2, B3.
R-etikedoj: C1 (Praha), C2 (Haarlem),
C3 (Darmstadt)
Taxa Pago : TP2 (kooperativo)

Tion - eĉ la plej fervoraj filatelistoj ne ŝatas. Tamen mia opinio estas, ke ili eraras.

Neniu povas prezenti ĉe la poŝto por ricevo de stampo P.P. malpli ol 1000 kovertojn aŭ kartojn. Kiam iu sendanto de presaĵoj, reklamiloj, prospektoj ktp (escepte de privataj korespondaĵoj) sendas minimume kaj ope almenaŭ 1000 ekzemplerojn, li ĝuas favoran poŝt-tarifon laŭ certaj kondiĉoj:

- la aĵoj devas esti deponitaj je ejoj, tagoj kaj horoj precize fiksitaj de la poŝtadministracio.

- la sendanto devas ilin klasifiki laŭ la ordo de la distribuo.

Post plenumo de tiuj kondiĉoj la administracio akordas favoran tarifon, ekzemple la nunaj enlandaj specialaj tarifoj estas: 0,26 FF por opa sendo de minimume 1000 ekzempleroj, per ne urĝa trafiko, por koverto ĝis 20 gramoj.

La ordinara tarifo por letero estas:

- 0,30 FF por unuopa koverto ĝis 20 graoj per ne urĝa trafiko.

- 0,50 FF por sama koverto per urĝa trafiko.

Prezentante la aĵojn por la sendo ili povas esti:

a) ĉu afrankitaj per afrankmaŝino.
b) ĉu afrankitaj per specialaj poŝtmarkoj, kiuj estas antaŭ-poŝtstampitaj. Franclingve oni nomas tiuj pm "préoblitérés",
c) ĉu ne afrankitaj. Tiam la sendanto pagas la ŝuldatan sumon - 0,26 FF x N ekz. - kaj lasas la kovertojn. Ili estas poste stampitaj per la fama stampilo P.P. ĉu permane ĉu meĥanika.

Tiu stampo (P.P. = Port Payé = sendkostoj jam pagitaj) do atestas la daton de la sendo kaj anstataŭas la surgluon de poŝtmarkoj.

Tiu sistemo de stampo estas multe pli facila por la poŝto kompare al la surgluo kaj stampado de pluraj miloj da similaj korespondaĵoj. Kalkulu vi mem kiom da milionoj da pm estas spar-

itaj, ĉiutaĝe, en nuntempa mondo, kiu estas inundata de reklamiloj kaj presaĵoj.

Malgraŭ la renkontitaj malfacilaĵoj por akiri tiujn stampojn ili meritas nian plenplenan favoron. Tio, kio ne estas facile akirebla, donas specialan spicon al la kolektado. Ĉu ne? Fakte tiuj stampoj havas veran filatelan valoron: ili anstataŭas pm kaj funkcias kiel la aliaj maŝinstampoj. La centra bloko de la datstampo indikas krom la tagdato ankaŭ la horon de la elsendo. Do tiuj stampoj estas vere kompletaj, kaj kiam ili akompanas Esperantotekston ili estas - por ni - kolektindaj.

Pasintjare mi skribis al vi pri simila stampo en Monako. Mi estas konvinkita, ke por ĉiam ĝi restos raraĵo. Ĉi-jare saman problemon ni havas, kaj ĝin solvi ne estos facila afero.

Nun mi demandas: ĉu identan prezenton ne havis ankaŭ pli malnovaj francaj E.varbstampoj? La respondo nur apartenos al la rezulto de senlacaj serĉoj, kiuj eble pruvos, ke kolekto de stampoj ne ĉiam finiĝas kun la kalendara finuzo de la stampilo.

Sed TIO ja estas kolekti!

Jean Amouroux

---

Imitinda ekzemplo!

Nia portugala amiko, s-ro Pedro da Silva sendas al ĉiuj membroj saluton per bela reklampresaĵo uzita de "TAP", la portugala aerlinio okaze de 56a UK en Londono. Ni esperas, ke la eleganta presaĵo plaĉas al vi, kaj kore dankas al Pedro da Silva por la bona ideo sendi tiun memoraĵon □

-8888-

## GLUMARKOJ

Glumarkoj 1972

1) 37a nacia kgr de Esperanto, Jan 6-10 1972, Wellington, Novzelando. Sama desegno kiel je 34a kaj 35a kgr kun la totem - fosto, sed nun kun positiva, malhelverda preso sur helverda papero. (pap. 55x44) tranĉita. La markoj estas kolektitaj en blokoj kun po 50 pecoj kungluitaj je la maldekstra eĝo. (NZEA. P.O. Box 330. Wellington. N.Z.)
2) La jubilea, 50-a germana Esperantokongreso okazos en Braunschweig. Mi ne scias ekzakte la daton, sed kutime oni kongresas en Germanujo dum Pentekosto. Glumarko jam aperis kun desegno de staranta, mordema, heraldika leono, kiu ŝajne intencas disŝiri Esperanto-stelon. La koloroj estas tegolruĝa kaj verda. (V)(25x37) folio 5x2=10. trapikita. (Heimlich sendis)
3) 57a Universala kgr de Esperanto. Portland, Oregon, USA. 29/7 - 5/8 1972.(V)(30x39) trapikita folio 2x5=10. Verda stelo, nigra teksto kaj ruĝlila kartskizo de USA kun la kongresurbo markita.

## POŜTSTAMPOJ

Poŝtstampoj 1971. (daŭrigo)

7) Ronda, d. 33 mm. Laŭranda teksto: Hungara - Jugoslava Esperantista Renkontiĝo * (granda skravita stelo) Mohács. 1971.

15) Gyula, Hungario. 6-9/7. 9-a Somera Esperanto Universitato. Ŝildforma kadro. sama desegno kiel lastjare. 33x40 mm (Szemenyei sendis)

16) Abaliget, Hungario. 17 - 27/7 (dato 21/7 ne uzita). 4-a internacia renkontiĝo naturamika. (stelo, floroj, montoj kaj 2 manoj). rektangula. 23x45 mm □

-oOOo-

## "KOR-ĜEMO" PRI STAMPOJ

Mia ĉefa intereso por kolektado de Esperantaĵoj estas ja la Glumarkoj, kaj speciale la porokazaj markoj. Sed kiel malnova, energia kolektanto de niaj naciaj poŝtstampoj mi ja ne daŭre povis subpremi la intereson ankaŭ por la Esperanto-stampoj. Komprenеble mi konservis dum la jaroj ĉiujn la poŝtkartojn, kiujn amikoj sendis al mi de diversaj kongresoj, kaj same mi ankaŭ mem ne forgesis sendi "salutkartojn" al mia propra adreso, se mi partoprenis kongreson.

Iom post iom amasiĝis tiuj salutkartoj tiel, ke mi "iun tagon" konstatis, ke mi fakte jam posedis sufiĉe por ke mi komencu sisteme kolekti - ankaŭ Esperanto-stampojn.

Nun mi komencis interŝanĝi kaj aĉeti kovertojn kaj kartojn ĉe kolektantoj - kaj fine ankaŭ en la AREKa Stamp-Servo.

Sed io tre ĉagrenis min, kiam mi venis tiel longe; kaj tio estas, ke oni tiel ofte renkontas ne-komprenon por la filatelaj kvalitoj ĉe tiuj kolekt-objektoj.

Por ke stampo povas havi valoron, ĝi devas almenaŭ aspekti aŭtentike uzita. Koverto sen adreso sed kun poŝtmarko stampita per E.stampo havas en si mem neniun filatelan valoron.
Por havi tion la poŝtaĵo devis esti ekspedita kaj distribuita de la poŝto, kaj oni devas povi vidi tion senpere sur la objekto. Tial es-

tas necesa, ke ĝi devas esti adresita kaj plene afrankita rilate al la adreso kaj la speco de la sendaĵo: letero, karto aŭ presaĵo en- aŭ eksterlande.

Tial mi petas vin ĉiuj, kiam vi okaze lasos stampi stokon de ne-adresitaj kovertoj, kiujn vi mem kunportas hejmen de la kgr. poŝtejo por havi ilin kiel ŝanĝobjektojn estonte, - ke vi neniam plusendos ilin sen surskribita adreso. Se la afranko estas nur por enlanda aŭ enurba sendo, skribu mem iu ajn l o k a n adreson sur la koverton. Sendu neniam ne-adresitan koverton eksterlanden, se ĝi ne estas afrankita por tia sendo, minimume kiel presaĵo.

Se vi ĉiam agas laŭ tiu principo, viaj amikoj eksterlandaj ne sentas sin trompitaj pro la fakto, ke la objekto ne iris tute legale la vojon de la poŝtejo al la adresato. Oni ja ne povas vidi tion sur la koverto.

Do, mi deziras ricevi kovertojn, sur kiuj estas skribita aŭ stampita adreso - ĉu mia aŭ alia estas egala - sed ĉiam en akordo kun la afranko.

Reinhold Jensen.

---

Mi atentigas, ke mi povas liveri:
Katalogo pri porokazaj glumarkoj.

Prezo: inkl. sendkostoj 2 US-dol. aŭ 16 rkp.

Katalogo pri ĉiuj Esperanto-poŝtstampoj

Prezo: inkl. sendkostoj 1 US-dol. aŭ 8 rkp.

Reinhold Jensen.Sdr.Ringg.77. DK-8000 Århus C.
(mia poŝtĉeknumero estas: København 97728)

---

La venonta numero aperos en decembro. Sendu materialon por ĝi en bona tempo.